NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto Liceo
Atocha 98-4°.28012 Madrid
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz Junio 1993
*******************************************************************

## KOTIZO DE MADRIDA ESPERANTO LICEO POR 1993

La kotizo por tiu-ĉi jaro estas sama ol 1992. Bv. **sendi ĉekon po 2.000 ptjn,** je la nomo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID. Antaŭdankon por via kontribuo al daŭrigado de MEL.

## UK VALENCIA.

La kongresa temo estas "Klerigo por la 21-a jarcento", pri ĝi oni prelegos, forumos kaj diskutrondos.

INFANA KONGRESETO. En Alborache (Valencio) helpos dum la kongreso madridanino Monica Cruz.

ANTAŬKONGRESO EN BARCELONO. Jam aperis programo kaj ofero de hoteloj por tiu-ĉi evento kiu okazos inter la 20a. kaj la 23-a de julio.

HONORA KOMITATO. La balotado, unu monato kaj duono antaŭ UK, por Hispana Parlamento faras malfacile trovi politikajn membrojn por honora komitato

GAZETARA SERVO. En junio ekde Madrido, oni disdonis unuan informilon al 400 adresoj de amas-medioj. Se vi havas konatulon en hispana ĵurnalo, radio-emisoro, kpt.,bv. kontakti Liceon por faciligi dissendon de novaĵoj.

KORUSO VERDA STELO LUDOS EN U.K. Dum la nacia festo la madrida koruso "Verda stelo" premierigos kantaton laŭ muziko kaj teksto de Pedro Vilaroig.

HELPANTOJ BEZONATAJ. LKK ankoraŭ bezonas kelkajn helpantojn por labori en diversaj taskoj dum UK. Se vi estas preta por dediĉi kelkajn tagojn al organizado bv kontakti kun Valencia grupo aŭ LKK. Kelkaj madridanoj jam oferis sian kongres-tempon por labori.

**JAM APERIS "Esperanto: fenómeno de la comunicación", la plej aktuala libro hispan-lingve pri la internacia lingvo. Prezo 1.300 ptjn (inkludas IVA-on kaj sendokoston al Hispanio). 20% rabato pro pli ol 5 ekzempleroj. ANTAŬPAGO NECESE, pere de POŜTMANDATO, al Esperanto-Liceo de Madrid. Atocha 98-4°. 28012 Madrid. NE SENDU ĈEKON.**

MONHELPO POR UK PARTOPRENANTOJ

Aparte de kubanaj esperantistoj aliaj (ankaŭ hispanoj) bezonas mon-helpon por vojaĝi al Valencio. Ekzemple la direktoro de la esperanta eldono de Radio Polonia. Sendu ĉekon aŭ poŝtmandaton al Esperanto-Liceo de Madrid.

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4° Madrid

**N I A   V O Ĉ O**
**Organo de Madrida Esperanto-Liceo**
**Atocha 98-4°.  28012 Madrid**
**Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz**  **Junio 1993**

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO
(Nia voĉo oferas siajn paĝojn al HEF-CO por centrigi **madridajn** esperantajn informojn kaj faciligi kontaktojn kun Esperantaj grupoj kaj madridaj esperantistoj pere de revuo pli ofta ol Boletin).
Ĉiu-lunde ni kunvenos,ekde la 18.30 horo, en MEL, Atocha 98-4°
Marde/ĵaŭde, ekde la 18.00 h. ĝis la 20,30 h funkcias HEF-CO (Rodriguez S.Pedro 13- 3°-7). Aliaj tagoj uzu automatan respondilon: (91) 446 80 79

MIĈJO INTERVJUITA
En "Esperanto" Aprilo 93 Miguel Fernández estis intervjuita de A. Valen rilate al siaj literaturaj rilatoj kun la internacia lingvo.

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ** (Aliĝiloj ĉe MEL)
RENKONTIĜO. Kataluna E-Junularo. 24-28-a junio. Abanilla (MURCIO)
LITERATURA FORUMO EN BARCELONO. 17-a ĝis 22-a de julio
78-a ANTAŬKONGRESO EN BARCELONO. 20-a ĝis 23-a de julio.
78-a U.K. DE ESPERANTO EN VALENCIA. 24-a ĝis la 31-a de julio.
27-a Konferenco de ILEI. 31-a julio ĝis 6-a aŭgusto.Paterna(Valencio)
78-a POSTKONGRESO EN MADRIDO. 1 ĝis 6-a de aŭgusto.
49-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO. Vraca (Bulgario). 7-14a aŭgusto 1993.
Aliĝo pere de Kataluna E-Junularo. Apdo. 32318.08080 Barcelona.
KULTURA ESPERANTO FESTIVALO. 19-22 aŭgusto. Kopenhago (Danlando)

MEL oferas someran T-ĉemizon po 600 ptjn, plus sendokosto. 20% rabato se vi aĉetas pli da 20.
* * *  Ni  sendas  remburse  * * *

**ESPERANTISTOJ EKSTERLANDE**
La Honora Prezidanto de la Liceo, Augusto Casquero, vojaĝis al Bydgoszc (Pollando) por prelegi pri hispana kulturo. Ankaŭ la juna Akademiano Jorge Camacho partoprenis en TEJO Seminario organizita de Kroatia Esperanto-Asocio en Pula (Kroatio).

**EKDE SEGOVIO**
Nia kara amiko Cesar daŭrigas sian laboron per la disvastigado de Esperanto. Nun pere de hispana revuo pri telegrafio kaj pere de leteroj al provincaj ĉefoj de poŝto kaj telekomunikado. Sukceson!

**NOVAJ ESPERANTAJ STRATOJ EN CASTELLBISBAL KAJ MADRID**
Jam ni povas konfirmi inaŭguron de strato ESPERANTO en la urbo Castellbisbal (Barcelono) la 22an de julio je la 19.00 horo.

**Madrido la_ peto de Madrida Esperanto-Liceo, denove havas straton "D-ro Zamenhof", ĝis la jaro 35 la nuna "Travesia del Conde Duque" nomiĝis tiel. La nomo estis donita al nova strato, en norda kvartalo de Madrido, proksima al strato Telémaco, dank'al peno de S-ro Agustín Blasco, ĵus forpasinta.**

**DONACO AL IBEROAMERIKAJ ATENEOJ**
Madrida Esperanto-Liceo kaj Hispana Esperanto Federacio subvenciis donacon de la libro "Esperanto fenómeno de la comunicación" al ĉiuj partoprenantoj en la Kongreso de Ateneoj okazinta en Madrido je la mezo de majo. La libroj estis donacitaj por la ateneaj bibliotekoj.